# *Denunco de Kubo: Usono ne havas moralon por paroli pri homaj rajtoj.*




Havano, 24 okt (RHK) En gazetara konferenco en tiu ?i urbo, la kuba ministro pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodríguez, denuncis novajn manovrojn usonaj, kiu ser?as aliancitojn por ne subteni la projekton de rezolucio de la kariba insulo kontra? la usona sie?o.

La rezolucio tekstas: Bezono ?esigi la ekonomian, komercan kaj financan blokadon de Usono kontra? Kubo; ?i estos prezentita la 31-an de oktobro en UN.

La kuba ministro emfazis ke Usono ne havas moralon por paroli pri homaj rajtoj. Li aldonis ke estas devo de kiu ajn diplomato estas “defendi la veron(…) malebligi ke estu perfortataj la procedurojn kaj ke estu atakataj suverenaj ?tatoj.”

Rodríguez emfazis ke tiu ?i estas “manovro propagandcela (…) por manipuli la publikan opinion”.

Li memorigis ke la 7-an de novembro de 2006, Washington anka? klopodis amendi la kuban rezolucion, tamen, mocio pri ne agado ricevis solidan subtenon de 126 membro-?tatoj kiuj favoris Kubon.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/174794-denunco-de-kubo-usono-ne-havas-moralon-por-paroli-pri-homaj-rajtoj

**Radio Habana Cuba**